

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht), Nederlando.

Kunlaborantoj: d-ro E. J. Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo) Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J. Vernoux, sac. (Francujo.) Eusebio, Maynar (Hispanujo), Prof. H. G. Wannemakers S. J., G. Ellerman kaj d-ro W. J. A. Manders (Nederlando), d-ro W. Solzbacher (Usono.).

NOVJARA ALVOKO DE LA PREZIDANTO

S⁵³₁₉ur la sojlo de la nova jaro oni kutimas interŝanĝi bondezirojn. Mi esprimas miajn kristanajn bondezirojn al ĉiuj karaj legantoj de 'Espero Katolika'. Donu la bona Dio al ni ĉiuj la daŭran pacon kaj progreson de nia kara movado en katolikaj medioj ĉu laikaj ĉu ekleziaj. Dum la pasinta jaro ni povis noti ampleksan progreson kaj kreskon de niaj movado kaj revuo. En diversaj en-kajekstereŭropaj landoj ni konstatis kreskon kaj grandan simpation por nia I.K.U.E., nome en Sud-Ameriko, en Japanujo kaj en Hispanujo. Dum la jaro 1952a ni havis la honoron kaj la feliĉon organizi dum la Internacia Eŭkaristia Kongreso en Barcelona la IIan Esperanto-Mondkunvenon. La sukceso estis granda kaj entenas grandan promeson por la estonteco. Nuntempe, pli ol iam, Esperanto vivas kaj ĝuas la rekonon de la plej granda parto de internaciaj organizoj, i.a. la Unesko kaj de la homaro. Ni daŭrigu fervore nian idealan laboron. La neceseco de internacia lingvo estas pli granda ol iam; distancoj ne plu ekzistas, la mondo sopiras al vera kristana paco kaj deziras plivastan kunlaboradon inter la ŝtatoj.

Por la jaro 1953a mi ŝatus fari specialan alvokon al ĉiuj karaj legantoj:

1. Ni estu propagandistoj por nia revuo kaj por Esperanto en nia propra ĉirkaŭaĵo. La bona rezulto estos rekompenco por ĉiuj.
2. Grandamase ni partoprenu al nia I.K.U.E. kongreso kaj pilgrimo en Lourdes de la 12a ĝis la 17a de Aŭgusto venonta. Ni montru al nia ĉiela Patrino ke ni amas Ŝin kaj esperas Ŝian protektadon en nia laboro.

Dankante al ĉiuj karaj kaj fidelaj kunlaborantoj por ilia agado dum la pasinta jaro, mi deziras al ili kurageon kaj entuziasmon por la proksima laboro. Al ĉiuj legantoj mi deziras Dibenitan kaj Gracoplenan Jaron 1953an.

A. Beckers, sac. o.

Prezidanto de I.K.U.E.

REZOLUCIO de pri ESPERANTO

La kunveno de **Unesco** estas pasinta. La petskribo favore al Esperanto estis vigle pridiskutata. Pri tio la tuta Esperanto-movado ŝuldas grandan dankon al la UEA-estraro, speciale ties prezidanto s-ro Malmgren, kaj al prof-o. I. Lapenna kaj s-ro Durrant, la konstanta UNESKO-komisiito. UEA faris gravajn preparojn pro la konferenco, disdonante materialon, kontaktante kun delegacioj, ktp. Ĝi sukcesis allasis al la Konferenco du oficialajn observantojn de UEA, nome s-roj Lapenna kaj Durrant. La 27an de Novembro prof-o Lapenna havis la honoron fari oficialan paroladon en la konferenco. Li jam preparis rezolucion, kiu tre koncize observis la realajn eblecojn. La 29-an de Novembro la svisa delegacio proponis rezolucion, kiu nur malmultediferencis de la pronita. La unua de Decembro ĉiu delegacio havis la tekston de la svisa rezolucio, kiel dokumento 7 C/DR 98 de **Unesko**. En la kunveno de la 3a de Decembro ĝi estis unuvoĉe akceptita de la laborgrupo pri kulturaj aktivecoj, formita de la programkomisiono kaj konsistanta el 20 ŝtatoj. La Ĝenerala Konferenco je la 10a de Decembro 1952a akceptis la rezolucionen modifita, pli simpla, formo laŭ jena teksto:

La Ĝenerala Direktoro estas rajtigita komuniki al Membroj-Ŝtatoj la Internacian Petskribon favore al Esperanto, kiu estas prezentita al la Unuigintaj Nacioj kaj transsendita de tiu Organizaĵo, al UNESKO, kaj entrepreni konforma al komentoj ricevitaj, la necesan preparlaboron por ebligi al la Ĝenerala Konferenco decidi, dum ĝia Oka Kunveno, pri la agoj farotaj je tiu ĉi Petskribo.

(La 8a Konferenco okazos en 1954 en Montevideo.)

Do la Ŝtatoj-Membroj de **Unesko** oficiale estos informata pri la Petskribo. Ili estos invitata al Komentoj, kiuj plej verŝajne estos redaktataj de la membroj de la Nacia Delegacio.

Ŝajnas al ni ke la sukceso, kvankam ne definitiva, estas tre kontentiga. Definitiva decido en la nunaj cirkonstancoj estus certe negativa por la Esperanto-movado. La definitiva aŭ provizora decido en 1954a dependos de la Komentoj de la Ŝtatoj.

Ŝajnas ni bone, se personoj kiuj havas sufiĉe gravan influon, povus ĉkscii ĉu kaj kiam la komunikado de la Ĝenerala Direktoro alvenas en la registraj oficejoj; kien ĝi estas direktata kaj kun kiu oni devas kontakti por ke tiu persono estu informata pri ĉiuj flankoj de la afero.

UEA faris multegan laboron kies rezulto ne povas esti riskata. Ŝajnas al ni ke nun la pli intensa laboro devas esti farata en la naciaj ligoj kaj ilia kunlaboro.

La Bona Dio donu al la personoj, kiuj devas pritrakti al aferojn la utilan saĝecon por atingi definitivon rezulton.

J.

Rimarkoj de la Administracio.

Kvankam nun en la komenco de la nova jaro ne estas ankoraŭ eble doni precizan raporton pri la pasinta jaro, ni povas konstati ke ni progresis en la bona direkto. Antaŭ unu jaro ni decidis, devigita de la cirkonstancoj, doni al la revuo pli simplan aspekton. La faktoj pruvis ke la decido estis ĝusta. Feliĉe preskaŭ neniu membró eksigis pro tiu fakto. Je la fino de la jaro la stato estis iom pli bona ol kutime je la jarfino. Dum 1952a ni povis doni 92 paĝojn. Ni jam pripensis enkonduki plibonigon de la aspekto. Tamen ni hezitas fari ĝin tuj, nekonante la reakcion de nia legantaro. **Se ĉiu tuj pagus la renovigon de la abono, ni povus preni pli facile decidojn pri eventualaj plibonigoj.**

La pagintoj trovos la membrokarton, respektive la kuponaron en sia revuo. Fidelaj al la idealo kaj solidaraj en la agado ni venkos la barojn

J.

Baziliko kaj katakomboj de Sankta Agnes

La Katakomboj estas veraj subteraj labirintaj koridoroj pli-malpli altaj, preskau ĉiam mallarĝaj, kiuj kruciĝas kaj renkontiĝas ofte, etendiĝante eĉ multajn kilometrojn. Ili estas simple tombejoj, en kiuj la kristanoj enterigis la korpojn de la mortintoj, ne sub la tero aŭ la planko, sed en kestoj aŭ ĉeloj fositaj en tofo, ilin fermante per ŝtona plato, sur kiun ili ĉizis la nomon de l'mortinto, kaj ofte ĝian familian nomon, ĝian aĝon kaj preĝon. Ne malofte ili aldonis simbolon aŭ penson pri fido. La Kristanoj deziris ripozi apud tombo de martiro, ĉar al ili ŝajnis trovi tiamaniere indulgon ĉe la Dia tribunalo. Multaj epigrafoj konservitaj donas al ni pruvon pri ĉi tiu deziro kaj pri ilia volo ne esti ĝenataj en la tomba paco. Kaj S-ta Ambrozo skribas: "Mi kredos min pli sekura se mi povos ripozigi miajn ostojn apud korpo de sanktulo." La virga kadavro de S-ta Agnes estis enterigita, en la familian tombejon en kampeto apud Vojo Nomentana. Kiam Konstantia tie konstruigis la Bazilikon, tiu fakto kaŭzis malordon en la tombejo: la antaŭa tombo estas detruita, sed la loko de la martira korpo ne estas ŝanĝita kaj ĝi kuŝas apud la unua ŝtuparo de la tombejo. En la lasta persekutado sennombraj estis la kristanoj ĉiuagaj, ĉiuseksaj kaj ĉiukondiĉaj, kiuj donis la vivon pro Kristo: kaj se nia Sanktulino, eĉ meze de tiom da martiroj, brilegis je tiel blinda lumo, ke ŝi vekis specialan entuziasmon kaj kulton tiom grandajn, ke ŝi estis celebrata de la grandaj Episkopoj kaj Doktoroj tiutempaj, tio signifas, ke la okazajoj de ŝia vivo kaj de ŝia morto estis vere eksterordinaraj. Tuj, kiam S-ta Agnes estis enterigita en la tombon al ŝi pretigitan de ŝiaj gepatroj en ilia posedaĵo ĉe vojo Nomentana, multaj kristanoj, entuziasmaj pro la virtoj de ŝi praktikitaj dumvive kaj speciale dum la martirigo, konstruigis al ŝi la tombon apud tombo ŝia, kaj ĉi tiu estis la origino de la Katakombo havanta ŝian nomon, aŭ almenaŭ de ĝia pligrandigo. Kiam pli kruela furiozis la persekutado, la katakomboj donis rifuĝon al la Pontifiko - kiu tie celebris la diservojn - al la pastraro kaj al la popolo, kiu tiam precipe vizitadis la tombojn de la Martiroj. Sed ankaŭ en la paŭzoj inter unu persekutado kaj alia, ili vizitis tiujn tombojn, precipe ĉe la datreveno de la entombigo, tago kiu iĝis konsekrita al la memoro de la Sanktulo. La Papo celebris tie la Meson; oni kanttis himnojn al la Martiro kaj oni teksis ĝiajn laŭdojn. Tiu kutimo restis ankaŭ dum pactempo. Kiam oni povis konstrui la bazilikojn kaj publike celebri la Sanktan Meson, la Papo, sekvata de la popolo, iris al la Preĝejo dediĉita al la Sanktulo, al kiu estis konsekrita la tago, kaj en ĝi li faris tion, kio ankaŭ nun nomiĝas "stacio". La Baziliko de S-ta Agnes estis konstruigata de Konstantia, kiel signo de dankemo pro ricevita favoro, kaj de respekto al S-ta Agnes. Oni ne konas la ĝustan jaron, en kiu oni komencis ĝian konstruadon; sed estas certe, ke ĝi ekzistis antaŭ la jaro 358a. Kaj nia opinio estas, ke la pia princino klopodis plenumi sian voton tuj post la apero de dekreto, per kiu oni konsentis la pacon al la Eklezio. Kaj dum imperiestro Konstanteno, sia patro, konsilita de Papo S-ta Silvestro - Pensis pri la konstruo de Baziliko al la Redemptoro kaj al la Princoj de l'Apostoloj, Konstantia pensis al sia kara Agnes kaj metadis ĉiujn zorgojn por ke la Baziliko, kiun ŝi estis stariganta, estu la plej riĉa je marmoroj, kiel decas al la nevenkebla heroino de Kristo, al kiu ŝi volis ĝin dediĉi, kaj al la malavareco de la imperia princino, kiu estis ordoninta ĝian konstruon. Sed la nuna Baziliko, kvankam tre antikva, ne estas ĝuste tiu de Konstantia. Ĉar ĝi estis en malbona stato, ĉu pro antikveco, ĉu pli kredeble - pro la rabado de malamikaj milistaroj, ĝi estis plurfoje rekonstruata en kvina kaj sepa jarcentoj de Papoj Simmako kaj Honoro. I. De tiu epoko, troviĝante ekster la ĉirkaŭremparo, ĝi devis suferi gravajn damaĝojn dum la militiroj de la Longobardoj, de Frederiko IIa kaj dum la prirabado de Romo en 1527a. Sed ĉiam ĝi estas renovigita kaj beligita zorge de la Papoj kaj de la popolo, kiuj ne povis forgesi sian grandan Sanktulino, fieron kaj gloron de la roma nobelaro kaj junularo. La Baziliko estas antaŭata de nartekso, destinita, laŭ antikva kutimo, al la nebaptitoj kaj al la pentofarantoj; malgranda korto apud la Baziliko estas ĉiuflanke ĉirkaŭata de buntaj,

rozujo portantaj gajan noton meze de tiuj antikvaj konstruaĵoj. Oni malsupreniras al la Preĝejo per larĝa ŝtuparo el 43 ŝtupoj dividataj de ok plataĵoj. Fine de la ŝtuparo, marmora tabulo surhavas epigrafon el dek versoj, per kiuj Papo s-ta Damaso - el kvara jarcento - memorigas la virtojn de la Sanktulino. La Sankta Pontifiko komencas notigante la grandan kuraĝon de Agnes, kiu, je la eksplodo de la persekutado, sen eĉ plej eta timo, tute ne pensante sin kasi, defiis la koleron de la tirano kaj malzorgis la minacojn kaj la turmentojn, ĉar kiom ŝi estis malforta en la korpo, tiom ŝi estis forta en la spirito. Krome li memorigas la miraklon de la flamoj kiuj ŝin respektis, kaj de la mirakla plilongiĝo de la haroj por kovri ŝian korpon - kiun li nomas templo de l' Sinjoro - kaj li finas sin rekomendante al la Sankta Martirino, gloro kaj fiero de la Virgulinoj konsekritaj al Dio. Mal suprenirinte la longan ŝtuparon kaj enirante en la antikvan templon oni ricevas profundan impreson pro ĝia grandiozo kaj soleno, en la absido, brilas riĉa mozaiko de l' sepa jarcento, en kiu, meze, elstaras la bildo de Agnes vestita per solena imperiestra vesto, riĉa je oro kaj juveloj. Ŝi estas la reĝino de ĉi tiu loko; ĉi tie ripozas ŝiaj ostoj, kiuj atendas la gloran reviviĝon, kusantaj sub altaro, sur kiu troviĝas tabernaklo subtenata de kvar porfiraj kolonoj. Kun la restaĵoj de Agnes estis tien metataj ankaŭ tiuj de Emerentiana, por ke tiuj, kiuj estis tiom amikaj dumvive, tiel estu ankaŭ en la tombo

De la maldekstra navo de la Preĝejo, per ŝtuparo fosita en tofo, oni malsupreniras al la katakomboj ricevintaj la nomon de Agnes, kaj etendiĝantaj sub la baziliko, kiuj estas el la plej bone konservitaj. En ili la vizitanto ricevas fortan impreson, kaj, se li memoras la historion, li devas pripensi, kiom da martiroj tie preĝadis kaj tien estis enterigitaj, kiom da Papoj tie kunvenis kun la Kristanoj kaj celebris la Sanktan Diservon, kiom da knabinoj, kaptitaj de la ekzemplo de S-ta Agnes, tie ĵuris eternan fidelecon al Jesuo Kristo Reĝo de la Martiroj kaj de la Sanktaj Virgulinoj.

Nuntempe, post mil sescent jaroj la memoro pri la Sanktulino estas ankoraŭ viva kaj parolanta. Ŝia tombo estas ankoraŭ vizitata kaj kovrata per floroj, kaj ŝia nomo ankoraŭ alvokata kun fido kaj ankaŭ por ŝi veriĝas la diro de la Sankta Spirito: La memoro pri justulo estos eterna. Paŭlo IIIa konstruigis por Agnes kaj Emerentiana belegan sarkofagon el oro kaj arĝento, kiu estas sub la ĉefa altaro, kaj kiu antaŭe estis nevidebla; okaze de la S-ta Jaro la Paroĥestro de S-ta Agnes malfermigis aperturon en la muro, kaj tiel oni povas admiri la valoran tombon.

La luksaj loĝejoj de Imperiestroj, kiuj tremigis la mondon, disfalis; restas nur grandiozaj ruinoj, ofte kovrataj de hedero aŭ de dornplenaj branĉoj; sed la Martiroj, kies ostoj estis kaŝe enterigitaj en la mallumajn katakombojn, havas nun, en plena lumo, fierajn Bazilikojn, kiuj estas mirindaĵoj de la mondo kaj celo de senĉesaj pilgrimadoj. Mistera forto tiras la gentojn de ĉiuj nacioj al la altaroj de la unuaj herooj de la Kristanismo, al kiuj Romo, ĉiam superbela en siaj manifestadoj, dedicias cion plej eble valoran, kiun oni povas trovi laŭ materio laŭ arto.

L. Minnaja

Se vi volas travivi intense la tempon de la unuaj Kristanoj, speciale koni la vivon de S-ta Agnes, tiam aĉetu ĉe nia Libroservo la libron de Kardinalo Wiseman: FABIOLA. Broŝurata f 4.50. Bindita f 8.-- + 10% sendkostoj. 436 paĝoj de klasika Esperanto-stilo !

LIBRO - ELEKTSERVO

(estro: p. J. F. S. Smeehuyzen S C J)

(DAURIGO DE LA LIBRELEKTILO 1950)

BOVET, Pierre - Enketo pri Internacia Helplingvo - B, V*, 41 : 408.92

CLISSOLD, Peter - Marista Terminaro - A B IV, 656.61

CAPEK, Karel - Rossumaj Universalaj Robotoj - M. E. P. - A, II, 82

DA SILVA, Agostino - Historio de Nederlando - de Freitas - A, IIIo, P, 90(492)

* La Portugala Literaturo - de Freitas - A, IV, N, 8 (091) (496)

La Edzino de l' Arkitekto

Verkis: Antonio de Trueba (1821-1888)

Ĉirkaŭ la mezo de la 14a jarcento Toledo estis sieĝata de Don Enrique de Trastamara; sed la urbo, fidela al la reĝo kun la kromnomo 'la Kruela', oferis bravan obstinan rezistadon. La lojalaj kaj kuraĝaj Toledanoj ofte estis transirintaj la belegan ponton de Sankta Marteno - unue la plej brilaj konstruaĵoj de tiu urbo plena je belegaj monumentoj - kaj ĵetintaj sin sur la tendaron de Don Enrique, staranta sur la 'Cigarrales', kaŭzante malĝajan detruon al la sieĝanta armeo. Por malebligi la ripetadon de ĉi tiuj atakoj, Don Enrique decidis al la ruinigo de la ponto. La 'Cigarrales', sur kiuj la arma tendaro staris, estis belegaj terenoj kun riĉaj fruktarbejoj, plezurĝardenoj kaj someraj restadejoj. La famo de ilia belegeco inspiris Tirson kaj multajn hispanajn poetojn kanti ilian laŭdon. Iun nokton la fekundaj arboj estis falgataj de la soldatoj de Don Enrique kaj amasigataj sur la ponto. Je tagiĝo enorma fajro furiozis sur la ponto de S. Marteno, kiu akiris monstrajndimensiojn: ĝiaj malbonsignaj flagroj prilumis la detruantajn bandojn, la kurantan fluon de la Tago, la palacon de Don Rodrigo kaj la Araban Turon. La krakado de la fortaj kaj masivaj kolonoj, konstruitaj kun perfekta fakkapableco de la metiistoj kiuj kreis la mirindaĵojn de la Alkambro, sonis kiel la ĝemanta krio de la Arto sufokata de Barbarecc. La Toledanoj, vekigitaj pro ĉi tiu abonema spektaklo, alkuregis por savi la belegan konstruaĵon de la kompleta ruino minacanta ĝin, sed ĉiuj iliaj klopodoj restis vanaj. Terura krakego, sonanta super la golfoj kaj valoj akvumitaj de la Tago, informis ilin ke la ponto ne plu ekzistas. Ho ve! estis vere! Kiam la leviganta suno orumis la kupolojn de la Reĝa Urbo, la toledaj knabinoj kiuj venis al la rivero por plenigi siajn kruĉojn en la pura kaj kristala rivero, malĝaje devis reiri kun la malplenaj kruĉoj sur siaj kapoj: la klaraj akvoj fariĝis malpuraj kaj ŝlimaj, ĉar la fuziozaj ondoj kunportis la ankoraŭ fumantajn ruinojn de la ponto. La indigno de la popolo atingis sian plej altan gradon kaj transpasis ĉiujn limojn, ĉar la ponto de S. Marteno estis la ununura vojo al la ĉarmaj Cigarraloj. Kunigante siajn fortojn por unu sola ekstrema ekpeno, la Toledanoj faris furiozan buĉadon en la tendaro kaj post kiam la sango fluis en torentoj, devigis la malamikan armeon al la forkuro.

II

Multaj jaroj pasis post la detruo de la ponto de S. Marteno. Reĝoj kaj ĉefepiskopoj estis projektintaj planojn por anstataŭi ĝin per alia konstruaĵo de egalaj fortaco kaj beleco, sed la genio kaj persistemo de la plej famaj arkitektoj ne eblis plenumi iliajn dezirojn. La rapidaj, potencaj fluoj de l'torento detruis kaj forbalais la trabaĵojn kaj kadraĵojn, antaŭ ol la gigantaj arkajoj povis esti finkonstruitaj. Don Pedro Tenorio, la Kardinalo-ĉefepiskopo de Toledo, al kiu la urbo dankas sian gloron preskaŭ samezure kiel al la reĝoj, sendis diskonigistojn al ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de Hispanujo, invitante arkitektojn, kristanajn aŭ maŭrajn, enterpreni la rekonstruon de la ponto de S. Marteno, sed sen rezultato. La venkotaj malfacilaĵoj estis juĝataj nevenkeblaj. Finfine unu tagon viro kaj virino, absolute fremduloj en la regiono, eniris Toledon tra la Kambrona Pordego. Ili atente inspektis la detruitan ponton. Tiam ili luis malgrandan domon apud la ruinoj kaj preparis sian restadon. La sekvintan tagon la viro rapidis al la ĉefepiskopa palaco. Lia eminenco Moŝto estis en konferenco kun prelatoj kleruloj kaj distingaj nobeluloj, kiuj estis altirataj de liaj pieco kaj saĝeco. Granda estis la ĝojo kiam unu al liaj servistoj anoncis, ke arkitekto el malproksimaj regionoj petis la honoron de aŭdienco. La Kardinalo ĉefepiskopo rapidis por akcepti la fremdulon. Post la unuaj salutoj lia eminenco Moŝto petis lin eksidi. 'Ĉefepiskopa Moŝto, komencis la fremdulo, 'mia nomo, kiu estas nekonata al via Eminenco, estas Juan de Arévalo, kaj mi estas laŭprofesia arkitekto. 'Ĉu vi venas responde al la invito per kiu mi konvokis kapablajn arkitektojn por rekonstrui la ponton de S. Marteno, kiu en pasintaj tempoj estis ligilo inter la urbo kaj la Cigarraloj?' 'Efektive estis tiu

invito kiu irigis min al Toledo. 'Ĉu vi konscias pri la malfacilaĵoj de la konstruo?' 'Mi tre bone konscias pri ili. Sed mi povas venki ilin. "Kie vi studadis arkitekturon?' 'En Salamanka. 'Kaj kiun konstruaĵon vi povas montri al mi kiel pruvon de via kapablo?' 'Absolute neniun, Eminenco. 'La ĉefepiskopo faris geston de malpacienco kaj misfido, kiun rimarkis la fremdulo. 'Mi estis soldato en mia junaĝo, li daŭrigis, 'sed malbona sano devigis min forlasi la malfacilon profesion de la armiloj kaj reiri al Kastilio, mia naskiĝlando, kie mi dediĉis min al la studado de l'artiketuro, teroria kaj praktika. 'Mi bedaŭras, 'respondis la ĉefepiskopo, 'ke vi ne povas nomi iun eminentan projekton kiun vi efektivigis. 'Ekzistas kelkaj konstruaĵoj sur la Tonnes kaj la Duero al juĝataj al aliuloj, sed kiuj devus honori tiun, kiu nun alparolas vin. 'Mi ne komprenas vin. 'Mi estis malriĉa kaj nekonata, daŭrigis Juan de Arévalo, 'kaj mi nur klopodis perlabori panon kaj loĝejon. La gloron mi lasis al aliuloj. 'Mi tre bedaŭras, 'ripetis Don Pedro Tenorio, 'ke vi ne kapablas certigi nin ke nin vane konfidus en vi. 'Eminenco, mi povas oferi al vi unu garantiaĵon kiu certe kontentigos vin. 'Kio estas tio?' 'Mia vivo! 'Ekspliku! 'Kiam la kadraĵoj de la centra arkaĵo estos forigataj, mi, la arkitekto, staros sur la fermiga ŝtono. Se la ponto falus, mi pereus kun ĝi. 'Mi akceptas la garantiaĵon. 'Eminenca Moŝto, fidu al mi, kaj mi plenumos la taskon! 'La ĉefepiskopo premis la manon de l'Arkitekto kaj Juan de Arévalo foriris, la koro plena je ĝoja espero. Lia edzino estis maltrankvile atendanta lian revenon. Ŝi estis juna kaj ankoraŭ ĉarma, malgraŭ la detruoj kaŭzitaĵ de mizero kaj suferoj. 'Katarina! Mia Katarina' kriis la arkitekto, prenante sian edzinon en siaj brakoj, 'inter la monumentoj plibeligantaj Toledon troviĝos unu kiu transdonos al la posteularo la nomon de Juan Arévalo!'

III

La tempo pasis. La Toledanoj, alproksimiĝante la Tagon trans la krudajn rifojn kaj solecajn lokojn kie en antaŭaj tempoj troviĝis la 'Ĝardeno de Florinda' nun ne plu povis diri: 'Tie ĉi iam estis la ponto de S. Marteno. 'Kvankam la nova ponto ankoraŭ estis subtenata per solidaj trabajoj kaj masivaj kadraĵoj, la centra arkaĵo jam elstaris super la ruinoj de la antaŭa ponto. La ĉefepiskopo, Don Pedro Tenorio, kaj la Toledanoj supersutis per donacoj kaj laŭdoj la bonŝancan arkitekton, kies kapableco estis liginta la centran arkajon spite la furiozan potencon de la ondegantaj torentoj kaj kiu kun sentima, persistanta kuraĝo kompletigis la gigantan verkon. Estis la antaŭvespero de la festo de S. Ildefonso, la patrono de la urbo Toledo. Juan de Arévalo respektplene informis la Kardinalon-ĉefepiskopon, ke nu ankoraŭ nur estas forigotaj la lignaĵoj de trabajoj kaj kadraĵoj por fini la laboron. La ĝojo de la Kardinalo kaj de l'popolo estis granda. La forigo de la trabajoj kaj kadraĵoj subtenantaj la masonaĵon estis tre danĝera laboro, sed la trankvilo kaj konfido de l'arkitekto kiu estis doninta sin mem kiel garantiaĵon por staranta sur la fermiga ŝtono atendi la konsekvencojn: sukcesi aŭ perdi sian vivon, inspriris ĉiujn de perfekta fido. La solena beno kaj inaŭguro de la ponto de S. Marteno estis fiksata ja la sekvonta tago kaj la sonoriloj de ĉiuj toledaj preĝejoj gaje sonoritis por anonci la grandan, morgaŭan okazontaĵon. La Toledanoj ĝoje rigardis de la altaĵoj super la Tago la ĉarmajn Cigarralojn, kiuj dum multaj jaroj estis restintaj kaj silantaj, - vere, preskau forlasitaj - sed kiuj la sekvontan tagon estos revokitaj al la vivo. Je vesperiĝo Juan de Arévalo suriris la centran arkajon por vidi ĉu ĉio estas preta por la inaŭgura ceremonio. Li mallaŭte kantetis dum li inspektis ĉiujn laborojn kaj preparojn. Sed subite esprimo de teruro aperis sur lia vizaĝo. Penso estis trafinta lin - penso, glaciigante lian sangon. Li forlasis la ponton kaj rapidis hejmen. Sur la ŝiĝli lia edzino akceptis lin kun brila rideto kaj gaja gratula vorto. Sed vidante lian zorgoplenan mienon ŝi morte paliĝis. 'Granda ĉielo! 'Ŝi ekkriis konsternite, 'Ĉu vi estas malsana, kara Juan?' 'Ne, kara edzino, 'li respondis, klopodante regisian emocion. 'Ne trompu min! 'Via mieno rakontas min, ke io ĝenas vin. 'Ho, la vespero estas malvarma kaj la laboro estis troa. 'Envenu kaj eksidu ĉe la fajrujo kaj mi preparos la vespermanĝon; post kiam vi estos ion manĝinta kaj ripozinta, vi certe denove estos trankvila!'

'Trankvila! ' murmuris Juan en si mem en spirita agonio, dum lia edzino okupis sin per la preparo de la vespermango kaj metis la tablon apud la fajron, en kiun ŝi jetis faskon da branĉoj. Juan faris ekstreman klopodon por venki sian malgoujon, sed tio restis vana. Li ne sukcesis trompi sian edzinon. 'La unuan fojon en nia geedza vivo, ' ŝi diris, 'vi kaŝas ĉagrenon antaŭ mi. Ĉu mi ne plu estas inda je viaj amo kaj konfido?' 'Katarina! ' li ekkriis, 'pro amo al la ĉielo, ne pligrandigu mian ĉagrenon pridubante mian amon al vi! '

'Kie ne ekzistas fido, ' ŝi respondis pasie, 'tie ne povas esti amo. '

'Tiam respektu, pro mia bono kaj via, la sekreton kion mi kaŝas antaŭ vi. ' 'Via sekreto estas cagreno kaj mi deziras koni kaj malpezigi ĝin. '

'Malpezigi ĝin? Tio estas neebla! ' 'Por amo kiel mia nenio estas neebla. ' 'Bonege, tiam aŭskultu. Morgaŭ mia vivo kaj mia honoro estos perditaj. La ponto devos fali en la riveron kaj mi mem sur la fermiga ŝtono pereos kun la konstruaĵo, kiun mi kun tiom da angoro kaj tiom da espero estas kreinta. '

'Ne, ne! ' ekkriis Katarina, premante sian edzon amplene inter siaj brakoj, sufokante en sia koro la teruron per la sciigo. 'Jes, mia kara edzino! Dum mi estis fidanta je mia triumfo, mi konsciigis ke la ponto, pro eraro en miaj kalkuloj, devos fali kiam morgaŭ la kadraĵoj estos forigitaj. Kaj kune kun la ponto pereos la arkitekto kiu projektis kaj direktis ĝin. ' 'La ponto povos droni en la akvoj, sed ne vi, karulo mia. Surgenu mi petegos la noblan Kardinalon, ke li malligu vin de via terura kontrakto. ' 'Kion vi deziras estos vana. Eĉ se la Kardinalo konsentus vian peton, mi rifuzas la vivonsenigitan de honoro. ' 'Vivon kaj honoron vi ambaŭ havos, kara edzo, ' respondis Katarina

IV

Estis meznokto. Juan, elĉerpita pro ĉagreno kaj angorplena laboro, finfine estis endorminta; febra dormo kiu pli multe similis premsonĝon ol la dolĉan riparanton de la Naturo. Intertempe lia edzino dum kelka tempo ŝajnigis sin dormanta. Sed ŝi maltrankvile observis sian edzon. Kiam ŝi estis certa ke finfine li profunde dormas, ŝi senbrue glitis el la lito kaj apenaŭ kuraĝante spiri, ŝi ŝtelmove iris al la kuirejo. Tie ŝi singarde malfermis fenestron kaj elrigardis. La nokto estis malluma; intertempe akraj lumradioj prilumis la ĉielon. Neniu sono aŭdigis krom la bruego de la tondrantaj fluoj de la Tago kaj la gemado de l'vento tra la trabajoj kaj komplikaj kadraĵoj de la ponto. Senbrue Katarina fermis la fenestron. El la fajrujo ŝi prenis unu el la duone forbrulitaj, ankoraŭ bruletantaj faskoj, kaj jetinte mantelon sur siajn ŝultrojn, ŝi kun sovaĝe batanta koro iris tra la silentaj stratoj.

Kien ŝi iris? Ĉu ŝi portis tiun brulantan faskon kiel torĉon por lumigi sian vojon en la densa mallumo de senluna nokto? Estis vere danĝere, ĉar la malglata tero estiskovrita per rompitaĵoj rokŝtonoj. Tamen ŝi klopodis preskaŭ kaŝi la lumantan lignaĵon sub sia mantelo. Finfine ŝi atingis la ponton. La vento ankoraŭ gemis kaj fajfis kaj la rivero daŭrigis la rompadon de sia fluego kontraŭ la kolonoj, kvazaŭ incitita renkontante obstaklojn kiujn ĝi ne plu kapablas forbalai.

Katarina alproksimigis la subtenan muron de la ponto. Nevola tremo de teruro kuris tra sia korpo. Ĉu estis ĉar ŝi staras sur la bordo de tiu abismo de furiozaj akvoj? Aŭ ĉu estis ĉar ŝia mano, ĝis nun nur kutimiginta al bonfaroj nun svingas la torcon de detruo? Aŭ ĉe eble ŝe tremas ĉar en ĉi tiu momento enorma tondro eksplodas sub la ĉiela arkaĵo? Svinginte la torĉon por denove ekflamigi ĝin, ĝi tenas ĝin kontraŭ la seka, rezina legno de la trabajoj. La legno rapide ekflamas kaj la flamo, alblovita de la vento, suprenkuras kun terura rapideco, karesante kaj brakumante la arkaĵojn kaj kadraĵojn de la ponto. Nun ŝi rapide forlasas la scenejon. Helpata de la flagroj de la fajro kaj la vivantaj fulmradioj lumigante la ĉielon, Katarina transpasis la spacon separante ŝin de sia hejmo. Ŝi eniras ĝin same senbrue kiel ŝi forlasis ĝin kaj fermas la pordon. Sia edzo ankoraŭ profunde dormis kaj ne estis rimarkinta ŝian foreston. Katarina ree pretendis profundan dormon kvazaŭ ŝi neniam estus ellitiginta. Kelkajn minutojn poste aŭdigis en la urbo la bruo de multaj homoj kuregantaj, dum de ĉiuj turoj la sonorilo konigis la teruran alarmon de la fajro. Enorma krakego sekvis, tuj poste angorkriego, same kiel antaŭjaroj kiam la sieĝanta armeo detruis la antaŭan ponton.

Juan vekigis terurigita; Katarina kuŝis je lia flanko, ŝajne trankvile dormanta. Li rapide vestis sin kaj kuris eksteren por ekscii la kialon de la

tumulto. Je sia sekreta ĝojo li ekvidis la ruinon de la brulanta ponto. La Kardinalo-ĉefepisko kaj la Toledanoj atribuis la katastrofon al fulmradio trafinta la centran arkajon kaj ekbruliginte krome la tutan konstruaĵon. La ĝenerala malĝojo estis profunda. Granda ankaŭ estis la publika simpatio kun la senespero kiun la katastrofo devis esti kaŭzinta al la arkitekto, kiu troviĝis en la antaŭvespero de granda triumfo.

La enloĝantoj neniam sciis ĉu estis ĉiela fajro akcidento kiu kaŭzis la brulegon, sed Juan de Arévalo, kiu estis bona kaj pia homo, firma kredanta en la protekto de l'ĉielo, neniam dubis eĉ dum momento en sia kredo, ke la ponto vere estas detruita per fulmo.

La detruo de la ponto tamen nur prokrastis la triumfon de Juan per dekduo da monatoj. La sekvintan jaron, je la sama festo de S. Ildefonso, lia nova ponto estis solene malfermata de la Kardinalo; kaj la feliĉaj Toledanoj denove transiris la Tagon por viziti la ĉarmajn terenojn de la Cigarraloj, kiujn ili devis malhavi dum tiom da jaroj. Je tiu memorinda tago la Kardinalo celebris la okazon per brila festeno. Je lia dekstra mano sidis la arkitekto kaj lia nobla edzino; kaj post ekstreme laŭda parolado de la Kardinalo la tuta ĉeestantaro en tumulto de aplaŭdo forkondukis Juan kaj Katarinan al ilia hejmo Kvincent jaroj pasisdepost tui tago, sed la ponto de Juan ankoraŭ fortike staras super la bruegantaj akvoj de la Tago. Lia dua kalkulo ne enhavis eraron!

trad. T.D.

* * * *

La Unuiĝo de Internaciaj Asocioj, Centro de Servo por la Internaciaj Organizoj ne-Registaraj, en Bruselo, kun kiu ni havas lasttempe agrablajn rilatojn, publikigis liston de 228 internaciaj kongresoj en la tuta mondo en 1953. Krom nia Pilgrim-kongreso ni citas: La ĉiujara kongreso de PAX ROMANA en Germanujo; La Konferenco de la Prezidantoj de Internaciaj Katolikaj Organizoj en Romo (8-11 Marto 1953); Internacia Katolika Filmo Oficejo - studkunveno en Malta (13-15 Aprilo 1953); Internacia Katolika Oficejo por la Infanoj (4a kongreso) en Germanujo en la monato Majo; Internacia Katolika Komitato por la Radio kaj Televido en Kolonjo (Germanujo) de 6-10 Majo 1953. Tutmonda Unuiĝo de Societoj Katolikaj de Filozofio en Bruselo (20-26 Aŭgusto 1953)

* * * *

N I A X X I V a.

La jenaj personoj ĝis nun donis sian konsenton aliĝi al la HONORA KOMITATO: Kanoniko Camille DUVAUX, Prezidanto de la Katolika Franca Ligo; Parizo. Generalo Louis BASTIEN, Parizo.

s-ro MONTILLOT, Deputito de Haute Saône.

Al la ORGANIZA KOMITATO (vidu E.K. de Decembro 1952a) aliĝis ankoraŭ.

Grafino de Briey, en Parizo

PREGTEMO de la PILGRIM-KONGRESO: La Universaleco de Eklezio kaj la Paco. Inter la predikantoj estos R.P. J. Nogueira Machado S.J. el Brazilo.

PROGRAMO: Estos sufiĉe frue definitive fiksita, kiam ni scios la horojn de la religiaj manifestacioj. Ni havos mesojn, procesiojn de Sanktega Sakramento, procesion de la kandeloj, viziton al la tombo de Pastro Peltier, ĝeneralan kunvenon de IKUE, viziton al la kastelfortikaĵo, se eble komunan manĝon kaj laŭvole ekskursojn en la bela regiono.

KOTIZOJN vi povas legi en la aliĝilo en la antaŭa numero, kie ankaŭ estas la adresoj de nia reprezentanto. Post la unua de Marto venonta ili estos plialtigataj, do kaptu la kazon, kaj ensendu tuj la aliĝilon. Se vi ankoraŭ ne pagis la renovigon de via abono, faru ĝin tuj kaj samtempe.

* * *

AKTUALA MANIERO DE FASTADO,

La „vendreda ofero“.

La iam severa eklezia fasto-ordono dum la tempo, precipe en la lastaj jardekoj kaj ankaŭ kaŭze de ofte eksterordinaraj dolorigantaj cirkonstancoj estis tiom mildigita, ke vera fastado kiel efektiva ofero, por multaj fakte ne plu ekzistas resp. ne validas. Granda nombro de kreduloj estas pro diversaj kaŭzoj oficiale esceptataj resp. dispensataj de la fastodevo.

Sed kutime tiam, kiam la eklezio konsidereme, indulgeme volas eviti, la homon ŝargi per devoj en ne-esencaj aferoj, jen el la eklezia anaro mem estiĝas, elkreskas **libervola sindediĉo** al ofero, neordonitaj oferemo kaj rezignemo! Tiel ankaŭ montriĝas rilate al fastado nuntempe.

Ĉar t.n. fastado je viando, rezigno manĝi viandon vendrede, jam de longe ne plu estas senkondiĉa ordono por ĉiuj, kaj tia rezigno resp. fastado kia ĝi estas nuntempe praktikata, por multaj ja certe ne estas vera, almenaŭ ne granda ofero, tiel estiĝis diversaj aliaj celadoj de oferemo. Unu el tiuj estas ekzemple, ke oni ĉiuvendrede rezignas de alkoholajoj, eventuale la (tabak-) fumadon aŭ s.

En Germanujo, Svislando, sed ankaŭ en Aŭstrujo tia **Vendredo-ofero** jam estas konata kaj ankaŭ praktikata. Precipe la fastotempo instigas oferemajn, rezignemajn katolikojn je tio! Okazas, ke iuj dum la tuta fastotempo vivas kiel abstinuloj, evitante ĝuadon de alkoholajoj, aliaj rezignas dum tuta tiu tempo tabakfumadon, iuj rezignas ambaŭ ĝuojn (alkoholon kaj tabakon). Ĉiuokaze **la vendredo** dum la fastotempo povas esti speciale instigaj por praktiki tian aktualan **fastadon** resp. sindetenon !!

Jam estis atentigata kaj alvokata la katolika popolo al tiu praktikado de la **vendreda ofero**; ankaŭ episkopoj kaj aliaj ekleziuloj kompetentaj benis kaj rekomendis ĝin!

Ni katolikoj fine ankaŭ scias, ke fastado ĝenerale laŭ bona intenco kaj prudenta apliko ne nur estas benplena por la animo sed ankaŭ benefika al la korpo! Same estas koncerne al tia kelktempa (ĉu ĉiuvendreda aŭ dum tuta fastotempo efektivigata) ni diru **moderna fastado**, resp. rezigno je trinkado de alkoholajoj kaj fumado. Ĝi estas ankaŭ laŭ saneca vidpunkto certe nemalkonsiderinda!

Kaj ni pensu plu: En diversaj partoj de nia tero nun miloj kaj miloj de kunfratoj **suferas persekuton** pro Kristo kaj Lia eklezio; ili devas elteni akrajn dolorojn animajn kaj ofte ankaŭ korpajn; de ili estas postulata oferemo ĝis **sindiĉo** de la vivo! - Ĉu ne ni, en kompara - facilege, povas oferi eventualan amon al trinkado aŭ fumado, almenaŭ vendrede aŭ dum fastotempo? Kompreneble **jam-abstinuloj**, rezignos alian emon, ekz. viziton de filmteatro, aŭ mangadon de dolĉaĵoj aŭ s. - ĉion pro **amo al Dio** kaj oferemo por la kunfratoj! Pro pentofaro ĝenerala!

Walter Mudrak
Wien.

Ni tutkore rekomendas la konsilojn de samideano Mudrak. Tamen ni rimarkas ke en Nederlando nuntempe la ekleziaj Leĝoj pri la fastado devas esti pli severe observataj ol antaŭmilite. Lastjare la episkopoj donis novajn ordonojn tiurilate. i.a. Estas malpermesate al katolikoj manĝi viandon ĉiuvendrede, eĉ dum vojaĝo, kaj la hotelistoj jam povas presenti senviandajn manĝojn.

* * *

La Federacia Fervojo en Germanujo (Deutsche Bundesbahn) eldonis ĉarman falfolion kun informoj pri la kostoj de vojaĝoj en Germanujo.
La reprezentantoj de Federacia Fervojo donas pliajn informojn.

* * *

La ĉefepiskopo de Rio de Janeiro Lia Eminentia Moŝto Jaime Kardinalo de Barros Camera, akceptis en speciala aŭdienco komisionon konsistantan el prof-o Carlos Domingues, d-roj Jose A. Pinto do Carmo kaj Mario Ritter Nunes, ciuj estraranoj de Brazila Esperanto-Ligo. Li akceptis lukse binditan ekzempleron de la libro Por iu pli bona mondo, kies antaŭparolon li mem verkis, kaj kiun la Brazilaj Instituto de Geografio kaj Statistikio dediĉis al la XXIIa Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Romo dum la Sankta Jaro 1950a. Sciiginte pri la prospera Esperantista movado en Brazilo, Lia Kardinala Moŝto deklaris, ke le donos al ĝi sian plenan apogon, tial ke ĝi estas afero dediĉita al la bono.

* * *

La presidantoj de kvardek naŭ brazilaj organizoj, reprezentantaj la publikan opinion sur la terenoj de estrado, komerco, edukado, sciencaj societoj, religio, artoj, k.t.p. adresis alvokon al la Tut-Amerika-Unuiĝo en Washington, la centra oficejo de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj por instigi ĝin rekomendi la studadon kaj uzadon de Esperanto kiel ilo por plifortigi amikecon kaj kunlaboron inter la popoloj de la Okcidenta Mondparto kaj tra la tuta mondo. La subskribantoj invitas la Organizon de Amerikaj Ŝtatoj por starti pioniran movadon de la amerikanoj por la adopto de la neŭtrala interlingvo kiel ilo de direktaj rilatoj inter la Ŝtatoj, de reciproka interkompreniĝo, ĉe internaciaj konferencoj, de edukado por la tuta popolo. Speciale la brazilaj gvidantoj proponas tri aranĝojn: (1) la grada enkonduko de Esperanto kiel fako en la lernejoj; (2) la uzado de Esperanto kiel helplingvo por la diskonigo de statistika informo kaj la distribuo de turista literaturo, laŭ la ekzemplo de Brazilo; (3) la adopto de Esperanto kiel oficiala lingvo ĉe Inter-Amerikaj Konferencoj kaj kunvenoj de estrara, science aŭ socia karaktero.

Inter la subskribantoj ni notis: La Katolika Agado de Brazilo; La Asocio de Jesuitaj Studentoj; la Socia Agado en la Ĉefdiocezo de Rio de Janeiro.

* * *

Post nelonga tempo elvenos nova PREGLIBRO en Esperanto, verkita de rev. sac. H.G. Wannemakers S.J. Ĝi enhavos i.a. la ĉiutagajn preĝojn, la neŝanĝigantajn preĝojn el la Misalo, kaj ĉion kion oni atendas en komplementa preĝaro. Estas verŝajne la unua fojo ke la preĝoj aperos laŭ la tradiciaj liturgiaj tekstoj. La tuta libro enhavos 250 paĝojn en komforta poŝformato. Ankoraŭ ni ne povas doni la precizan prezon, sed ni esperas ke, tuj kiam ĝi elvenos, vi ne forgesos mendi ĝin al ni.



NEKROLOGO

En la tagoj de Kristnasko 1952 forpasis el niaj vicoj. S-ro Alois K o u d e l k a, 81 jara, estinta ŝuisto kaj la lasta estro de Esperanto-Societo Emilo Peltier en Graz, kiu 1938 devis likvidiĝi pro la reĝimo de la naci-ozialistoj. Simpla homo, Koudelka tamen atingis preskau perfektan posedon de Esperanto, kion pruvis liaj multaj neriproĉeblaj artikoloj en 'Espero Katolika'. Krome lia ta uzanto de la stenografio laŭ Gabelsberger kaj vera estranto de sia gepatra lingvo-maloftaĵo en lia medio-la nun beate fordorminta samideano verkis ankaŭ specialan stenografio kun reguleco laŭ tiu de Esperanto kaj por Esperanto. Bedaŭrinde la financaj kapabloj nek liaj nek de liaj amikoj permesis la publikigon de lia inventaĵo. Depost duona jaro ĉiam pli malsana nia samideano mortis la urba maljunulejo, kiu ne informis nin. Tial kredeble neniu el ni povis lin akompani sur lia lasta iro R.i.P. Samtempe mortis nia samideano rev. sac. Josefo Bamps, paroĥestro en Merksem, (apud Antverpeno), Belgujo. Li devenis kiel esperantisto el speciala rondo en la seminario. Ĉiam li restis fidela al la idealo de la junago. Liaj multaj zorgoj en paroĥo en antaŭurbo de internacia haveno malhelpis dum la lastaj jaroj, ke li faris multe da bruo por nia afero. Por nia movado tamen estas perdo speciale en la katolika Flandrujo, kie nia movado antaŭmilite estis forta, sed nun tre malforta. R.i.P.



Lourdes

Lourdes (Lourdais aŭ Lourdois) nombras ± 10.000 enloĝantoj. Ĝi estas ĉefloko de la samnoma kantono en la regiono Argelès situata en la provinco Altaj-Pireneoj. La urbeto kuŝas pitoreske ĉe la larĝa fino de la sep Lavenanaj valoj, inter la lastaj kurbiĝantaj montetoj, kiuj enŝlosas la ebenajon de Tarbes, kaj la unuaj kru-taj montvojoj kiuj kondukas al la alta Pirenea montaro. La domoj estas konstruitaj sur neebena tero kaj kuŝas distre ĉe la bazo de granda soleca ŝtonego, sur kies supro estas la fortikaĵo, nun muzeo. Ĉe la piedo de ĉi tiu roko en la ombroj de alnoj, fraksenoj kaj poploj la rivero Gave fluas kaj frakasas sin en ŝaŭmaj ondoj kontraŭ la barantaj ŝtonoj. Ĝi ricevas plejparte sian akvon el la konata akvofalo de Gavarnie.

Legendo pri la Origino.

Lourdes estas tre malnova urbo. Legendo rakontas, ke iu reĝino de Etiopujo, nomita Tarbis, proponis sian manon kaj tronon al Mozeo, kiu rifuzis ambaŭ ĉar li estis liginta al Sefora, la filino de Jetro. Ofendita en siaj kvalitoj de virino kaj reĝino ŝi forlasis sian landon Etiopujon, faris longan vojaĝon kaj albordegis ĉe la rivero Adour, proksime al la Pirenea

montaro. La regiono plaĉis al ŝi. Ŝi ekloĝigis tie kaj fondis urbon, kiu ricevis ŝian nomon Tarba (Tarbes). Ŝia fratino, Lapurda, estis akompaninta ŝin. Laŭ la petoj de Tarbis la fratino konstruigis ĉe la piedoj de la Pireneoj alian urbon kiu ricevis la nomon Lapurdum. Pro eliĝo de la literop ĝi farigis La-urdum (Lourdes). La enloĝantoj de Lourdes en sia dialekto ankoraŭ diras 'Lorde'. Je duona horo distanco de la urbo kuŝas la pitoreska Lago de Lourdes; ĝi estas longa ± 1600 metroj, ± 500 metroj larĝa, 8 ĝis 9 metroj profunda kaj havas ĉirkaŭon de ± 5 kilometroj. Ankaŭ pri ĝi la popolo rakontas legendon. Laŭ la tradicio la urbo Lourdes ne kuŝis antaŭe sur la nuna tereno, sed tie kie nun rulas la ondoj de la lago. Em la pratempo ĉi tie estis prospera urbo en la valo. Sed la ĉasteco de la enloĝantoj malaperis kaj teruregaj malbonaj moroj kriis al la Ĉionpotenculo je venĝo. Dio malbenis la novan Somodon; ne la flamoj el la ĉielo forbruligis la urbon, sed akvoj al la tero kovris la pekantan regionon. Nur unu familio, kiu trovis indulgon ĉe Dio, sciis savi la vivon per la rifuĝo. Tamen scivolema kiel la edzino de Lot, iu virino turnis la kapon por vidi la detruigon, malgraŭ la malpermeso de la ĉielo. Kiel viktimo de malobeema scivolem la virino ŝanĝigis en ŝtonroko. Jam nun oni vidas sur la vojo al Poeyferré, proksime al Biskajo apartan kaj rektan ŝtonon: estas ŝi.

Trafa rememoro al la biblia historio de la subakviĝo de la tero kaj la ruiĝi de Sodomo.

A.

Centraal Bloembollencomité, Wilhelminastraat 13 rd, Haarlem (Nederlando) eldonis plurkolora ilustritan faldfolion 6-paĝan kun konsiloj pri plantado de florbuloj, k t p. Nepre petu la Esperantlingvan faldfolion.

* * *

Radio kaj Esperanto



Mallongoj: I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko.

		M. E. T.	
Lundo	23.15-23.40		Hilversum, 402m. kaj 188m I.M. (ĉiun duan lundon): V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando, socialistaj informoj.
Mardo	12.55-13.00		Bern, 48.66m., 31.46m., 13.94m P. D-ro Baur SRG, Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern.
	16.00-16.15		Wien, 203m., 25m., 30m., 41m., 48m., P. (ĉiun duan mardon).
	18.35-18.40		Bern, 48.66m., 31.46m., 19.60m., P.D-ro Baur
Merkredo	16.45-17.00	Graz.	417.2m. K. (ĉiun duan Mercredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	19.00-19.20	Roma.	25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma-Esperanto, Via Vitorio Veneto 56.
	20.30-21.00	Madrid.	225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	22.35-22.40	Wien	513m., 25.46m., 78.74m. I. Radio Wien, Argentinierstraat 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.35-08.40	Lille.	218m. I. Prof. Labit 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	09.30-09.45	Paris,	348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	12.55-13.00	Bern.	Kiel marde. P. D-ro Privat.
	18.35-18.40	Bern.	Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	19.00-19.20	Roma.	Kiel merkrede.
	23.15-23.30	Hilversum.	298m., P. N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando. 1a kaj 2a vendredo de la monato Protestantaj relegoj
Sabato	09.30-10.00	Rio de Janeiro.	375m., 30.71m. K. I. Radio Ministerio da Educação, Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	23.15-23.20	Hilversum.	298m. P.K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando. Katolikaj informoj.

Ni publikigas la liston kiel eble plej komplete, kaj ne povas promesi doni ĝin je ĉiu monato. Se venos ŝanĝojn ni publikigos ilin. Do konservu la liston. Bonvolu de tempo al tempo sendi vian raporton al la stacio, speciale ne forgesu nian katolikan stacion Hilversum en Nederlando.



1. rev. sac. A. Beckers, Overpelt-Fabriek, Belgujo
2. L.G.C. de Jong, Vleuten, Nederlando
3. F.J. Kovarik, Chicago, USA
4. P.J. Heinle, Clarkdale, USA.
5. rev. sac. G. Pausback, Chicago, USA
6. H. Soudee, Washington DC, USA
7. S-ino Vigelis, Long Beach, USA
8. mons-ro Rozman, Cleveland, USA.

Ni sincere dankas ilin, kaj esperas ke la listo daŭre kreskos.



KORESPONDADO

De la 6a ĝis la 15a de Marto 1953a okazos en Bruselo en la Palaco d'Egmont la Salono de la Inventantoj. Ne forgesu viziti ĝin kaj ĉiukaze la fotografistoj petu la Fotografiajn Alumetojn PHOTECLAIR. Ili estas facilaj, malmultekostaj, malgrandaj kaj ne bezonas specialajn aparatojn. Kvinope ili kostas malpli ol la lampoj. Havebla ĉe s-ro M. Ronsmans, apotekisto, 25 Rue Paul Wemaere, Bruselo (Belgujo).

José Alvarez, 1473 Santos Lugares, FCN 6 SM, La Plata (Argentino) 13-jara knabo kun ĉiuj landoj per poŝtkartoj.

s-ro Anton Sched, Schliesfach 44, (13 b) MÜNCHEN 2 BS, (Germanujo) deziras kontakti kun veraj samideanoj de la religio en la tuta mondo, speciale en Italujo.